

JEN JENI

Marto-Julio 1985

Volumo 1, Numero 2

La Estraro de ELNA


VIN

Bonvenigas!

Blek!

Blek!

Ba!



JEN JENI

Jam estas unu ELNA-NEWSLETTER.
Unu tia pli ol sufiĉas. Do, ek al la
laboro krei junularan bultenon. La
forĝantoj estas vi, la membraro de
JEN. Ni forĝu ja, paŝante antaŭen,
eĉ alilanden, kaj konstruu kune la
estontecon de Esperanto en Usono!

Mi Prezentes . . .

Brian McCullough, nova Vic-Direktoro de la CO de ELNA.



Brian estas JEN-ano kaj nun laboras en la Centra Oficejo de ELNA. Lastatempe li kaptis la okazon skribi kelkajn vortojn pri si mem:

"Mi naskiĝis la 15an de aprilo 1960 kaj jam aŭdis da impostaj ŝercoj multege pli ol mi deziras. Kvankam tio okazis en Salino, Kansaso, ĝis mia akcepto de tiu ĉi posteno mi loĝis preskaŭ la tuton de mia vivo en Kolorado-Fontejo, Koloradio.

"Originale, mi aŭdis pri Esperanto (aŭ legis, fakte) ĉe la domo de unu onklo, kiu posedis ekzempleron de libro de Mario Pei. Ĉar mi havis tiutempe nur 12 jarojn, mi legis pri la lingvo, iom miris, kaj tuj poste forgesis. Oktobre en 1982, pli-malpli, mi renkontis mencion de la lingvo en ekzemplero de La Senmakulstala Rato por Prezidento! de Harry Harrison kaj skribis al ELNA.

"Post tiam, per kelkaj hazardaj okazoj (kaj kiel multaj aliaj Esperantistoj) mi iom ensuciĝis en la profundaĵojn de la Movado kaj finfine mi akiris la postenon vicdirektoran de la Centra Oficejo. Dum tiu deĵoro mi ankaŭ ĉeestis la superan kurson en la SFSU-a Esperanta kursaro.

"Inter la San-Franciska Esperantistaro mi estas iom ne-kutima pro la malprofundeco de miaj spertoj kun alilandaj Esperantistoj, pro la fakto ke mi nur nun travivas mian unuan daŭran periodon ekster Koloradio. Tamen, mi tre entuziasmas pri la Lingvo kaj la Ideo, kaj nun ekkorespondas kun aliaj Esperantistoj en aliaj mondanguloj."

GEJ-ELNA Interŝanĝo

En 1983 Martin Haase, vic-prezidanto de TEJO, kontaktis ELNA por diskuti la eblecon starigi junularan interŝanĝon inter la Germana Esperanto-Junularo (GEJ) kaj JEN/ELNA. Tiujare 20 funkciuloj de GEJ alvenis San Francisco kiel labor-grupo por plani la programon por 1984. En 1984 10 GEJ-anoj vizitis San Francisco, kaj en 1985 ELNA finfine sukcesas sendi 16 gejunulojn al FR Germanio, plejparte dank' al la Fonduso Thompson fondita de Eugene Thompson (NC) por ebligi gejunulojn partopreni kongresojn esperantistajn. Por 1986 ELNA intencas refoje sendi 10-15 homojn al FR Germanio. Informo pri la aranĝoj aperos venontnumere kaj en la ELNA NEWSLETTER. La interŝanĝo estas la unua fojo ke usonaj gejunuloj amase partoprenis Movadajn kunvenojn en Eŭropo. Raporto pri la ĉijara programo aperos en la venonta numero de la JEN-bulteno.

El Nia Poezio

Super mi etendiĝis kupolo,
kupolo, simbolo de Io,
de Io, fulmanta radio,
radio en strangaŭreolo.
Super mi etendiĝis kupolo.

Jen sub mi disegiĝis profundo,
profundo, senfundo nigranta,
nigranta en rido faŭkanta,
faŭkanta simile al hundo.
Jen sub mi disegiĝis profundo.

Ĉiuflanke gardadas min muroj,
min muroj --- obturoj ĉirkaŭas,
ĉirkaŭas, moviĝon kontraŭas,
kontraŭas kun pezaj murmuroj.
Ĉiuflanke gardadas min muroj.

Mi kun koro ribela deziras,
deziras, sopiras Liberon,
Liberon, purigan aeron,
aeron.... Premite mi spiras....
Mi ribela Liberon deziras.

El *Prologo* (1919) far Eŭgeno Miĥalski

TEJO estas la junulara sekcio de UEA ekde 1957 kaj celas krei solidarecon kaj amikecon inter la diverslandaj gefjunuloj, kaj konscion pri la nuntempaj problemoj de la junularo kaj pri la monda lingva problemo.

SERVOJ

Pasporta Servo: Kontraŭ \$2.10 oni rajtas ricevi kaj uzi la liston de la Pasporta Servo kies celo estas faciligi internacian vojaĝadon, donante al la uzantoj la eblecojn gastiĝi ĉe esperantistoj ĉu senpage ĉu kontraŭ malgranda kompenso. Homoj kies nomoj aperas en la listo ĝin ricevos senpage.

Junulara Delegito: Ĉi tiu kategorio (JD) en la delegita reto de UEA estas por tiuj kiuj estas minimume 16-jara kaj maksimume 30-jara. La JD servas kiel ligilo inter la junulara movado kaj la ĝenerala movado esperantista; kaj ties adreso aperas en la JARLIBRO de UEA. Por iĝi JD aŭ ricevi pli da informo, petu formularon de ELNA. Vi devas esti individua membro de UEA almenaŭ unu jaron antaŭ la delegitiĝo.

Periodaĵoj: Ĉiu membro de UEA/TEJO ricevos la revuojn Kontakto kaj TEJO-Tutmonde 6-foje jare. Kontakto pritraktas precipe ne-Movadajn, sociajn aferojn, kaj TEJO-Tutmonde entenas Movadajn novaĵojn.

Membreco: Ĉiu homo ĝis inkluzive 25-jara aŭtomate iĝas membro de TEJO, aliĝinte al UEA. Por 1985 la kotizoj estas:

Membro-Abonanto(MA): \$30 -- Vi ricevos Esperanto revuon, la JARLIBRON kaj Katalogon de UEA, kaj la revuojn KONTAKTO kaj TEJO-Tutmonde de TEJO.

Membro-Jarlibro(MJ): \$12 -- Vi ricevos la JARLIBRON kaj Katalogon de UEA, kaj la revuojn KONTAKTO kaj TEJO-Tutmonde de TEJO.

Senmembreca abono al KONTAKTO: \$9.

**Sendu ĉekon pageblan al ELNA.
Indiku vian naskiĝdaton.**

Kalendaro

22-28 septembro, 1985:

Seminario "Kooperativoj kaj la Junularo." Tuzla, Jugoslavio. Kotizo: 150 guldenoj antaŭpagendaj al UEA. Diskutatos la socio-ekonomia rolo de kooperativoj kaj ilia taŭgeco kiel fontoj de laboro por gefjunuloj.

1985 oktobro:

Germanoj vizitas Kalifornion por la tria jaro de la GEJ-ELNA Interŝanĝo.

1986 julio:

SFSU-intensivaj kursoj esperantaj. Petu informon pri la klasoj kaj stipendioj per la Centra Oficejo de ELNA.

1986 julio-aŭgusto:

GEJ-ELNA Interŝanĝo, San Francisco. Detaloj sendiĝos al JEN-anoj kiam haveblaj.

26 julio-2 aŭgusto, 1986:

La 71^a Universala Kongreso de Esperanto, Beijing, PR Ĉinio.

1985 septembro-oktobro:

Germanoj vizitas San Francisco por la GEJ-ELNA Interŝanĝo.

Gravaj Anoncoj

JEN bezonas funkciulojn kiuj pretas fidele plenumi la devojn kaj taskojn de la organizo kaj ĝiaj oficoj. Interesatoj pri la sekvaj postenoj sin anoncu kun la aĝo kaj biografieto al la konstanta adreso de JEN/ELNA: Prezidanto, Vic-Prezidanto, Sekretario, Kasisto. Ni sendos balotilojn kun la venonta numero, se estas sufiĉe da respondoj.

La bulteno de JEN restas malgaje sennoma. Ni invitas viajn proponojn. La nomoj proponitaj aperos venontnumere. Oni jam sugestis: JEN NI, JEN-Bulteno, JEN JEN! -- ĉiuj taŭgaj, sed iom banalaj. La redaktoro elkore esperas, ke vi ekzercos la imagon, kaj elpensos pli bonajn sugestojn. Sendu al la konstanta adreso de JEN/ELNA.

Letero de la Prezidanto de TEJO

Karaj amikoj,

Nur rapida letero por informi, kiom mi ĝuis legi vian parodian ELNA TATTLER de majo/junio 1985. Bill Harmon donis al mi ekzempleron, kiam ni estis kune en Pekino por iu solenaĵo tie, kaj mi devis sufiĉe kaŝi ĝin, por ke ne okazu skandalo ĉe niaj ĉinaj gastigantoj!

Mi tre ĝojas, ke JEN denove havas periodaĵo. Finfine, sen gazeto, junulara esperanto-organizo apenaŭ povas vivi, des pli en lando tiel vasta kiel Usono. Mi do esperas, ke vi sukcesos arigi materialon por pliaj numeroj. Estas refreŝige, legi kion pensas pri Esperanto la usona humuro, kiu sufiĉe malsamas de la eŭropa. Se gravas unu afero, tio estas la maleŭropigo de Esperanto. De tro longe oni atendas, ke Esperanto estu rigardata laŭ la vidpunkto de siaj eŭropaj uzantoj. Do bonŝancon por via reaktiviĝo!

Sincere salutas

Ian Jackson
Prezidanto, TEJO

P.S. Vi nenie parodiis TEJO-on. Ĉu ĝi estas tiel perfekta, ke ne eblas? Aŭ ĉu TEJO estas tiel seka temo, ke eĉ vi ne kapablas pri ĝi ŝercumi?

NOTO DE LA REDAKTORO: TEJO estas sendube parodiebla, eĉ malsekiginda, sed la spaco mankis. Estontece, la spaco ne mankos --- tion ni garantios!

Por Via Informo

Derek Roff (NM), unu el la instigantoj pri la restarigo de JEN, nun loĝas en Nederlando, kie li laboras ĉe la Centra Oficejo de UEA. Li bonvenigas leterojn kaj poŝtkartojn, kaj eble povas servi kiel ligilo inter la junularo esperantista en Usono kaj la eŭropa Movado. Skribu al li per la adreso de UEA en Roterdamo.

Notinde

Tiu esprimo "tro juna" ĉiam sonis al miaj oreloj dum jaroj kaj jaroj. Al ĉio, kion mi ŝatis fari, mi aŭdis la rimarkon: "Vi estas tro juna, atendu iom da jaroj!" Feliĉe mi ne atendis, ĉar la tempo forpasis kaj ĉiam aŭdinte, ke mi estas tro juna por tio aŭ tio ĉi, mi rimarkis unu belan tagon, ke mi havas grizajn harojn kaj ke la juneco jam forflugis.

Aventuroj de Pioniro, Edmond Privat

Fronte al la Internacia Junulara Jaro: Historio de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Morberto Saletti

Disigi, verkante historion de la Esperanto-movado, ties junularan aspekton disde la ĝenerala, estas afero neniel sencohava; fakte, ekde sia komenciĝo, la Esperanto-movado floris ĉefe dank' al la laboro de aĝe junaj homoj, kiuj disvolvis la lingvon kaj ties bazan ideon, kompletigante la fundamentan verkon de Ludoviko Lazaro Zamenhof.

Hodiaŭ, preskaŭ cent jarojn poste, kvarono de la membraro de UEA konsistas el homoj, kiuj aĝas malpli ol 26 jarojn, aĝo, kiun oni konsideras limo de "juneco" en pluraj junularaj medioj, inkluzive Unuiĝintajn Naciojn.

En la komenca epoko de la esperantismo, junuloj rolis kiel pioniroj por la disvastigo de Esperanto: oni ne forgesu, ke, en 1878, 19-jara junulo ekparolis al amikoj pri projekto de nova, mondcela, neŭtrala lingvo, kiu utilu kiel interkomprenilo por la tutmondaj popoloj, sen ajna distingo rilate rason, grupapartenon, politikon kaj tiel plu.


Tiun junulon aliaj sekvis: la nuntempa Universala Esperanto-Asocio estis starigita, en 1908, far la 19-jara Hector

Hodler; la esperantistan klubon, en Prago, fondis 18-jara studento, Eduard Kühnl; jam en 1907 okazis sukcesa prelegvojaĝo, tra Usono, de la tiutempe 18-jara Edmond Privat.

Dum la komenca epoko, junuloj agis kadre de la ĝenerala movado, sed ne kiel aparta strukturo plie direktiĝanta al difinita aĝelgrupo; Tutmonda Esperantista Junulara Asocio (TEJA) naskiĝis nur en 1920, aperigante ĝis 1929 la revuon *Esperantista Junulara*. Okazis poste malvigliĝo, kiun kunkaŭzis la maljuniĝo de la tiutempaj aktivuloj, kaj netroa interesiĝo far la aliaĝaj movadanoj. En 1938, gesinjoroj van Veenendaal, instruistoj el Nederlando, aranĝis la unuan Internacian Junularan Kunvenon en Groet, Nederlando; antaŭe, en 1937, okazis en Birmingham, Britujo, kunveno franc-brita de lernantoj. Tiu ĉi dato, 1938, estas kerna dato por la junulara movado, ĉar, kadre de la LJK en Groet fondiĝis, laŭ decido de pli ol 200 partoprenantoj el dek landoj, Tutmonda Junular-Organizo (TJO).

****Daŭrigota en venonta numero****

NOTO: La ĉi-supra kaj venontaj tekstoj pri la historio de TEJO venas el *Esperanto-Dokumentoj 21E*, eldonita de la Universala Esperanto-Asocio en 1985.



Simbolo de la Internacia Jaro de la Junularo 1985

Aboni Gazetojn Plibonigi Vian Lingvonivelon

En Usono Esperantistoj ofte ne havas la oportunon praktiki la lingvon unu kun aliaj. La vasteco de la lando kaj la malmulteco de Esperantistoj tie ĉi ofte malhelpas komencantojn finlerni la lingvon. Sed ekzistas almenaŭ unu rimedo: la abonado de esperantlingvaj gazetoj. Inter 100 kaj 200 periodaĵoj regule aperas en Esperantujo — gazetoj por ĉies gusto kaj pri ĉia temo. Tiel oni povas renkonti la vivantan lingvon kaj ankaŭ plivastigi, plinternaciigi la propran vidpunkton — afero aparte grava por Esperantistoj. Ĉi-sube ni prezentas "juvelojn" de nia gazetaro. Abonu kaj ĝuu! Se la listigitaj gazetoj ne pikas vian intereson, anoncu vian deziron al ni: ni provos trovi la gazeton ĝuste taŭgan por vi! Abonu per ELNA.

El Popola Ĉinio: La monata gazeto de la Ĉina Esperanto-Ligo. 600-700 paĝoj jare. Koloraj ilustraĵoj, artikoloj primovadaj kaj ankaŭ pri la kulturo kaj popoloj de Ĉinio. 12 monatoj: \$10. 24 monatoj: \$17. 36 monatoj: \$24.

Fonto: Monata gazeto literatura el Brazilo. Redaktita de Wm Auld. Originalaj kaj tradukitaj rakontoj, poemoj. Belaspekta kaj bone presita. 1 jaro: \$15.

Heroldo: Sendependa ĵurnalo pri la Esperanto-Movado. 16 numeroj jare, kun suplementoj. Recenzoj, fotoj. 1 jaro: \$13 (marpoŝte) aŭ \$16 (aerpoŝte).

Internacia Komputado: Elstara pri-komputila gazeto el Hungario. 4 numeroj jare. Abonenda por ĉiuj komputil-fanatikuloj. 1 jaro: \$10.

Monato: Monata (kompreneble!) gazeto laŭ la formato de *Time* aŭ *Newsweek*. Ne pri Esperanto, sed en Esperanto. 1 jaro: \$26.75.

Ovo: Amuza gazeto el Jugoslavio. 15 numeroj jare. Rakontoj, bildstrioj, satiroj, ŝercoj. 1 jaro: \$12.

Nova Fru-Esperanta Manuskripto Eltrovita en la Arkivo de ELNA!

Antaŭ kelkaj monatoj la Arkivisto de ELNA, trakribante malnovajn poŝtkartojn flaviĝintajn, ekvidis plurpaĝan manuskripton. Ĝi evidente estas antikvaĵo el la prahistorio de Esperanto. La nomo de la verkisto mankas kaj la manuskripto kelkloke difektiĝis pro malnoveco kaj ĉar la Arkivisto hazarde disverŝis sur ĝin sian kafon. Ĉiukaze, restas sufiĉe da sendifekta teksto por montri ke vere temas pri elstara pioniro de nia lingvo. La poemoj meritas laŭtlegadon por ke la neordinara sono de la versoj tiel efiku kiel intencis la aŭtoro. La lingvaĵo entenas fantaziajn vortojn kunmetitajn kaj akcentan kaj gramatikan neregulecon, kiuj atestas al la antikveco de la poemoj. Ĉisube ni prezentas eltiraĵon. Aliaj sekvos en venonta numero.

I. Hum-peti,¹ d' Am' peti:
Satan' en val'.²
Hum-peti, d' Am' peti:
Duka grat-Fal'³
A, la ing'⁴ sorĉis!
Al la ing' man'
[En kor' dent', put';⁵ hum-peti
'Toget' . . . eta glan'!]⁶

Notoj: Melankolia, pesimista poemo, evidente de iu duko kies malagrablaj spertoj en amo lin kondukis al amaro.

¹ Amara egaligo de amo kaj morto. Amo, laŭ la aŭtoro, egalas al "peti humon," t.e., al la malkomponiĝanta ter-tavolo kiu estas metaforo por la tombo, morto.

² *Fudendum muliebrum*. Ŝajne la aŭtoron infektas iom da mizogineco.


³ Iom stranga kunmetaĵo. La verkisto ŝajnas diri ke la serĉo por amo rezultigas "Falon" (la majuskligo montras ke la duko aludas al la Kristana doktrino) en "valon" kie li vane penis satigi, for-grati sian amon.

⁴ Vd. 2.

⁵ La poeto rekte alvokas unuafoje la (eks-?) amatinon. Vd. 2 kaj 4 por la signifo de la epiteto "puto." Eble estas vortludo kun "putino."

⁶ La teksto klare estas fuŝa en la lastaj du versoj. La signifo ne estas klara en la sepa kaj en la oka la manuskripto legiĝas "togete ta glan'," kiu krom la lasta vorto ne havas sencon. "Glano" = ekstremaĵo de la *membrum virile* (kaj parenteze, manĝebla frukto. Vd. PIV). Evidente la kompatinda aŭtoro aludas al la ebla solvo de sia dilemo aŭ eble al la kaŭzo. Mi proponas ke ni legu "'toget' eta glan'" kaj rezignu pri la deĉifro de "toget." Eble, tamen, la ĝusta lego estas: "togit', eta glan'" kaj aludas al la uzo de kondomo kiu povas malhelpi plezuron/satigon samkiel koncipon. Tiukaze, la malĝusta elizio de la adjektiva finaĵo de "togita" povas indiki refoje la primitivecon de la versoj. Kp. la 16an regulon de la *Fundamenta*. Aŭ eble la aŭtoro lerte uzas personigon kaj alparolas la ŝirmitan "glanon": "O, togito!"

Redaktita kaj prinotita de:
Gregory V. Wasson



Ĉiutaga Esperanto

Okazis, kiel ofte, koktelfesto ĉe la domo de iu San-Franciska komercisto. Sed iom malkutime, ĉeestis malgranda grupo de Esperantistoj, kiuj libere kaj kun granda ĝuo prikomentis la aliajn festantojn, kaj de tempo al tempo ankaŭ aliajn personojn.

"Nu, kio okazas ĉe vi, Riĉjo?" demandis unu Esperantisto al alia.

"Ne multe, Tiĉjo," diris tiu. "Kiel vi fartas?"

Al tio Tiĉjo respondis tre malnoble kun teruraj ronkobraŭoj, kiuj ĉiam eskapis lian nazon kiam li ridis. "Ĉu vi aŭdis la diraĵojn de tiu fiulo antaŭe?" "Kiu fiulo?" La vizaĝo de Riĉjo montris konfuzon. "Estas ja multe da tiaj homoj tie ĉie."

"Tiu," la fingromontranta Tiĉjo klarigis. "Tiu, kiu sin nomas Muffy."

"La jusumpulo¹ tie, kun la desegnista² bandaĝeto sur la fingro?"

"Ĝuste tiu. Li antaŭe komentis, ke mono estas ĉio en la vivo. Tio ne validas por ni, ĉu?"

Riĉjo montris grandan indignon. "Certe ne! Ni neniam longe tenas nian monon, ĉar ni estas Esperantistoj. Kiom valoras kunloĝejo³ luksa, aŭ germana sportaŭto rapida kaj alloga, kiam estas malbone presitaj libroj por aĉeti kaj memgrandiozaj planoj por subteni? Jes ja, Samideano, pro kio la dolara bileto estas verda *dorsflanke*? Ni povus ĵuri solene" Li paŭzis embarasite. "Pardonu min. Mi de tempo al tempo ne tute bridas la emojn akiritajn de mi ĉe tiu oratoreca klaso."

"Jes, kompreneble," diris Tiĉjo. "Eble ankaŭ via menso ne tute ĉeestis."

"Fakte ja, mi malkomfortiĝis pri tiu japanusona ulo en la angulo. Ĉu vi vidas lin, sole starantan?"

"Li aspektas tre malfeliĉa. Ĉu vi aŭdis ion ajn de aŭ pri li?"

"Nu, li provas nun lerni Esperanton, kaj li kontrolis sian gramatikon ĉe mi. Li nur menciis, ke li kalviĝas kaj tre interesiĝas pri harakiro."⁴

La vizaĝo de la nekutime sentema Tiĉjo

blankiĝis. "Ho ve!"

"Ja vere! Nu, ne ekzistas nun io ajn farebla pri tio, kaj ~~eble~~ mi misaŭdis. Kun kiu juna blondulino parolis vi?"

"Ho, ŝi nomiĝas Lulubelle, kaj estas tre distra ulino," diris Tiĉjo. "Sed ŝi konsideras la vivon dancado, mi aŭdas, kaj ofte elserĉas novan partneron."⁵

"Do ŝi similas al nia gastiganto, aŭ al la Comte de Beaucaire ..." Riĉjo komencis.

"Ĉu ne de Beaufront?"

"Ne, tiu postlasis nur unu bastardan Idon"

Ĝuste tiam la tero mem eksaltis. La plafono dancadis. La japanusonano falis tra fenestro. Lulubelle, dum promenado trans la ĉambro, falis sur Riĉjon.

"TERTREMO!"⁶ kriis iu, reproklamante la memevidentan.

Finfine, la freneza fiasko finiĝis. Tuj Lulubelle bruligis cigaredon kaj demandis al Riĉjo, "Ĉu la tero moviĝis por vi, ankaŭ?"⁷

¹ Juna, supren-moviĝanta profesiulo. Ni tradukas, ĉar la rekta esperantigo de la angla *ruppie* estus *ĵupulo*, kaj tio temas pri aliaj kutimaj pekoj en San-Francisko, kiuj ne rilatas al mono (aŭ ne rekte).

² Angle: *designer*.

³ Angle: *condominium*; la esperanta traduko pli precize esprimas la moralan etoson de tiuj konstruaĵoj.


⁴ Priskribas ofte-okazantan emon, precipe en grandaj urboj, kie oni tre suferas emocie kaj ankaŭ tiras la harojn.

⁵ Se tiel diri.

⁶ Angle: *earthquake*. Preskaŭ nepre lernota vorto por iu ajn Esperantisto en San-Francisko.

⁷ Dirado ofte aŭdata post tertremoj.

— Brian McCullough






Korespondanta Servo Mondskala

Celo: Ligi novajn kaj korespondemajn esperantistojn tra la tuta mondo. La Servo ligas unuopulojn, kaj proponas korespondadon por lernejoj, ĉu interklase ĉu inter individuaj lernantoj. Por informo pri grupa/lerneja korespondado, kontaktu ELNA.

Unuopuloj: Skribu al la Servo donante jenajn detalojn: Nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. La Servo kutime ne agnoskas ricevon de via peto, sed tuj pludonos viajn informojn al jam registrita(j) korespondemulo(j) kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi devos do ricevi letero(j)n rekte de iu(j) korespondanto(j). Se post kelkaj semajnoj tio ne okazis, vi skribu denove al KSM por plia provo.

Reguloj:

1. Ĉiu peto devas esti akompanata per du internaciaj respondkuponoj (aĉeteblaj ĉe poŝtoficejoj).
2. La Servo ne respondas al demandoj ne skribitaj en Esperanto kaj ne trovas korespondantojn en aliaj lingvoj. La Servo ne povas respondi al filatelistoj.
3. Se vi deziras rektan respondon de la Servo, aldonu plian respondkuponon por pagi la afrankon.
4. Ĉiu registrinto en KSM devas nepre tuj respondi ĉiujn korespond-petojn kaj informi KSM se oni ne deziras akcepti proponitan korespondanton. KSM volonte ricevos informojn pri sukcesa korespondado.



Ne Krokodilul

Konstanta Adreso

JEN/ELNA
P.O. Box 1129
EL Cerrito, CA 94530

ELNA Komisiito pri
Junularaj Aferoj:
James F. Cool
137 N. Mulberry Street
Wilmington, OH 45177

JEN BULTENO

marto-julio 1985
Vol. 1, numero 2

Redaktis & kompostis: Gregory Wasson
Eldonis: Junularo Esperantista de Nord-
Ameriko

Ĉiujn manuskriptojn, desegnaĵojn, ktp.,
bv. sendi al la konstanta adreso de
JEN/ELNA. La redaktoro rezervas la rajton
lingve kontroli ĉiujn sendaĵojn.